

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 28 n-ro 4(126) 30.08.1977.
--	--

## KONTRIBUE AL LA KOMPREENO DE LA INTERNACIIISMO<sup>+/</sup>

T. TYBLEWSKI (JELENIA GÓRA, POLLANDO)

Esperantistoj praktikas la internaciismon. Tamen preskau neniom ni trovas en la E-literaturo pri ĝiaj problemoj. En la "DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE LA ESPERANTISMO" (Boulogne-sur-Mer, 1905.08.9.) oni povas legi jenan klarigon:

"La Esperantismo estas *penado disvastigi* en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu (...) donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus *servi kiel paciga lingvo* de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj *havas egalan intereson por ĉiuj popoloj*. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.  
(...)

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas." (Substrekoj miaj - TT).

Penado disvastigi la neŭtralan lingvon, kiu povus servi kiel paciga lingvo en la tuta mondo per verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj - jen la koncizigita difino de esperantismo, kiu povas esti komprenata kiel unu el la specoj de la internaciismo.

La nocio de la internaciismo apartenas al grupo de tiuj, kiuj ne estas sufiĉe komprenataj, kaj kiuj ricevas diversajn signifojn, depende de intenco de la uzanto. Plejparte aplikata far politikistoj, ĝi diferencas per diversaj atribuoj, precipe laŭ la ampleksoj.

<sup>+/</sup> Rezulte de la kolokvio, kiu okazis en Abaliget kun partopreno de Prof. d-ro B. Popoviĉ, J. Raabe, A. Sekelj, d-ro A. Rátkai, d-ro T. Tyblewski

La principoj de la internaciismo, proklamataj en la statutoj de politikaj partioj aŭ internaciaj organizaĵoj, ampleksas:

- kunlaboron en la strebado al libereco kaj progreso,
- amikecon,
- interkomprenon per informado pri vivo, esperoj, aspiroj, problemoj kaj obstakloj, atingoj kaj sukcesoj de diversaj nacioj,
- solidarecon,
- fratecon
- respondecon pri sorto de la homaro.

La diferencigo farita en la Deklaracio permesas kompreni kiel tute natura, ke esti esperantisto ne signifas esti internaciisto, kvankam fojfoje en niaj propagandaj tekstoj oni atribuis al la tuta esperantistaro la kvalitojn de la internaciismo. Tamen estas konstatita socia fakto, ke per apliko de la komprenebla lingvo ĉiu esperantisto bonŝancas obei almenaŭ al la baza principo de la interkomprenigado.

Disponante pri la rimedo interkompreniĝi kaj uzante ĝin diversforme jam naŭdek jarojn, esperantistoj devus kolekti sufiĉan sperton, por priskribi (bildigi) ne nur la strebadon aŭ penadon, sed ankaŭ rezultojn de la internacia kunagado. Kaj bildigi ne nur per menciado de la eventoj, sed - jes! - per analizo de la procezo, kiu - kvankam tre komplika - estas rekonebla en psikaj ŝanĝoj de individuoj, kaŭzitaĵ per la internaciaj lingvo kaj movado.

Kvankam iu ajn datreveno ĉi-rilate ne povas ĉefroli, ŝajnas, ke la proksimiĝanta centjara estas bona motivo, por lanĉi la esplorojn kaj diversmanieran respreguladon de la procezo. Dum la jardeko oni povas, almenaŭ oni bonŝancas, atingi tian staton de la memkonscio, ke la Esperanto-movado jam povas difini la kvalitan flankon de la internaciismo anstataŭ la ĝisnuna - preskaŭ sole - kvanta. Reprezentantoj de diversaj nacioj kaj socitavoloj stariĝas antaŭ esperantistoj la demandon pri esenco de esperantismo. La informoj pri nombro de internaciaj eventoj kun la uzo de Esperanto iusence seniluziigas la demandintojn, ĉar ili koncernas nur eksteran flankon de la mistera fenomeno, dum kiam ili atendas detalojn pri la interna. Ili volas sciigi, kio sekvas post la esperantistiĝo, kaj ili imagas, ke la sekvo estos rekonebla valoro.

Tiun valoron aŭ - ŝajne pliracie - tiujn valorojn ni esperantistoj ankoraŭ ne rekonis, evitante difini ilin. Tie aŭ aliloke oni konfesas pri fortaj sentoj aŭ pri ekkompreno, sed pro manko de helpe aŭ pro simpla premo de la ĉiutaga vivo oni rezignas pri pliprofundigo de la rekono.

Se esperantistoj mem ne scipovas *nomi* la plej karakterizajn fenomenojn de la internaciismo, kiajn ili de tempo al tempo travivas, la fenomenoj plu restas misteraj, nekonataj. Estas ja leĝo de ekkonado - doni nomon al la ekkonita.

Esperantistaro ne plu povas ignori tion, kio estas senduba atingajo de la internacia movado. La atingajo "havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" (laŭ Deklaracio). Rekonita, nomita kaj difinita ĝi povus esti la kontribuajo, kiun la mondo atendas de esperantistaro.

Por iusence plifaciligii la taskon, ni devus - penetrante ankaŭ la mondon de ideoj - provi difini tiujn homojn, kiuj laŭ ĝenerala opinio posedas ecojn de internaciistoj. Priskribinte ilin, ni havus la bildon de internacista personeco, kiu servus kiel kadro de la kontinuo. Ni lanĉu - koncerne najn esplorojn!